

NiaBulteno

ISSN:0871-9241

JULHO-SETEMBRO 2012 JULIO-SEPTEMBRO • Numero 95

Informa Bulteno de Portugala Esperanto-Asocio
Boletim Informativo da Associação Portuguesa de Esperanto

Rua Dr. João Couto, 6-^oA, PT-1500-239 LISBOA • +351 +217 141 359 • asocio@esperanto.pt • www.esperanto.pt

26-a R.P.E.: Palmelo, 2012.10.06-07

MARTA



Bonegaj kondiĉoj sed malamasa ĉeesto

Nur dektriopo ĝuis belan veteron kaj interesan programon en tre bona ejaro. Pĝ.4-5

Kursfinaj ekzamenoj sideje

Ok lernantoj al la sekva nivelo.

Pĝ.8

Aniĝkvanto rekreskas en 2012 sed ni ankoraŭ nanas ĉe U.E.A.

Temas pri kresko je novaj membroj, eĉ se daŭre la totalo ŝrumpas pro forpasoj. Sed por la Komitato gravas kotizoj; legu pĝ.6-7

Reaperas Apontamentos Gramaticais de Esperanto

Plian volumon da solida klareco.

Pĝ.7

Lisbona Zamenhoffesto

Festiĝos triopa jubileo la dekkvinan de decembro: 125 jaroj de esperanto, 120 el kiuj en Portugalio, kaj 40 jaroj de P.E.A. Pĝ.3

La tuta Eduardo NOVEMBRO: plena verkarlisto

Kion krome verkis la aŭtoro de Fetorafero, honore menciita en la Hanojaj B.K.j? Pĝ.10-11

Demandu ion ajn al traduzir@esperanto.pt!

pĝ.3

Nia Bulteno (informa bulteno de **Portugala Esperanto-Asocio**)
 N-ro 95 (2012.07-09) ISSN:0871-9241
Redaktis: A. MARTINS-TUVÁLKIN
Reviziis: A. S. ALMEIDA; Eduardo CRISPIM; NUNO MAGALHÃES
Eldonkvaranto: 280 ekzempleroj
Abono (4 n-roj/j., nur ekster PT):
 ½ de via landa M.A. de U.E.A.
Unuopa ekz. (92-95): 5,00 €
Rete: <http://www.esperanto.pt/dok/nb095.pdf>
Finkompostita en: 2012.12.03
Limdato por NB96: 2012.12.31
Kontakto: <bulteno@esperanto.pt>



Portugala Esperanto-Asocio
Associação Portuguesa de Esperanto

(pessoa coletiva de utilidade pública)

☉ sabate 15:00-19:00; sideje
 ✉ Rua Dr. João Couto, 6 r/c A
 PT-1500-239 LISBOA
 ☎ +351 217 141 359 ☎
 ☎ +351 261 988 181
 ✉ <info@esperanto.pt> (português)
 ✉ <asocio@esperanto.pt> (esperante)
 🌐 <http://www.esperanto.pt/>
 🌐 <pea_diskut@googlegroups.com>
 🌐 <http://www.facebook.com/pages/Portugala-Esperanto-Asocio/142303665812941>
 📧 <traduzir@esperanto.pt> (traduções)

CAE: 91331 **NIF:** 501 547 312
Fondita en 1972.04.25
Landasocio de U.E.A. ekde 1979
Kom.-Obs.: Faria de Bastos
Membroj: 96(+63) en 2012.12.03
Monata kotizo: 3,00 €
 (emeritoj kaj sub-18-jaruloj)
 2,00 €; nepagovaj: 0,00 €
Aniĝkotizo: 5,00 €
Pagojn al bankkonto:
 (BIC: CGDIPTPL) IBAN: PT50
 0035 0640 00 025 961 430 49 aŭ
 NIB: 0035 0640 00 025 961 430 49

GVIDORGANOJ: (ekde 2011.03.26)
General-Asemblea Stabo:
 <asembleo@esperanto.pt>

Prezidanto: Alexandra Paz
Sekretarioj: Rui Q. VALÉRIO
 Francisco MELO

Estraro: <estraro@esperanto.pt>

Prezidanto: José MARTINS
Vicprezidanto: Wilson BRÍGIDO
Sekretario: <sekretario@esperanto.pt>
 Iuri GASPÁR

Kasisto: <kasisto@esperanto.pt>
 Vítor MARQUES

Voĉdonantoj: Luís OLIVEIRA
 A. MARTINS-TUVÁLKIN
 Nuno MAGALHÃES

Êc ĉiuj malsufiças, ĉefe se, kiel ĉe ni (la portugalia esperantistaro), êc ĉiuj estas malmultaj. Jen plia pruvo, la ĵusa R.P.E. — kie malesto de unu aŭ du aŭ dek el ni kaŭzis korŝiran vaston da malplenaj seĝoj. Krome, ne nur pro statistika skalefeko nia malmulteco malutilas al ĝuinda komuno: Troe ni estas memmanuiloj, troe ivaj vidi sin unuope kiel malsamaj, apartaj, sia-specaj — kaj tial neindaj je kuna laboro. Tion ŝanĝi ne eblas, estas nia fato, ŝajne, sed eblas tion kompensi per multiĝo: Jen ankaŭ la ĵusa sidejkursaro, kun nekutima diplomiĝo de lingvo-lernintoj: Se kvalito nin ope unikigas, kvanto nin are normaligu, pensas via red.

Kontrol-Komitato: <kk@esperanto.pt>

Prezidanto: A. da Silva ALMEIDA
Revizoroj: Alcino ALVES
 Miguel BOEIRO

NEBALOTITAJ POSTENoj:

Lernado: <lernado@esperanto.pt>
 Nádia PENAS; Iuri GASPÁR
Libro-Servo: <vendejo@esperanto.pt>
 (vd. <<http://esperanto.pt/dok/katalogo.pdf>>)
 Rui Q. VALÉRIO

Biblioteko: <biblioteko@esperanto.pt>

Wilson BRÍGIDO
 (periodaĵoj) Wilson BRÍGIDO
 (eltondaĵoj) MARTINS-TUVÁLKIN
 (diversaĵoj) (vakas)
 (fotarkivo) A. S. ALMEIDA

Gazetaro: <imprensa@esperanto.pt>
 (vakas)

Eldonoj: <eldonoj@esperanto.pt>
 A. MARTINS-TUVÁLKIN

Subvencioj: (vakas)

Ekspozicioj: (vakas)

Komputservo: <admin@esperanto.pt>
 Nuno MAGALHÃES; Luís OLIVEIRA;

A. MARTINS-TUVÁLKIN
Sidejmastrumo: Pedrosa ALVES;
 Marta MARTINS

HONORAJ MEMBROJ:

António da Silva ALMEIDA
 Olga Serra Marques ALMEIDA ☺
 Manuel de FREITAS ☺
 Alsácia Fontes MACHADO ☺
 Alberto Pedro da SILVA ☺
 Adelino Franco SIMÕES ☺
 Manuel Maria Sousa TEIXEIRA ☺

JUNULARA SEKCIO:

Portugala Esperanto-Junularo
Jovens Esperantistas de Portugal
Fond.: 1993 **Membr.:** 11
 (L.S. de TEJO ekde 1996)

🌐 <http://www.esperanto.pt/pej.htm>

✉ <pej@esperanto.pt>

✉ <pej@esperanto.pt>
 ☎ & ☎ ĉe P.E.A.

LOKAJ SEKCIOJ:

PLUS — Portugala Loka Unua Sekcio (nordokc. sekcio; neag.)

Repr.: Nuno MAGALHÃES

Fond.: 2002 **Membr.:** 20

☉ Kafejo "O Piolho", Leonplaco,
 Oporto (antaŭavertul)

✉ Rua Paulo da Gama, 550-12º A
 PT-4150-589 PORTO

✉ <plus@esperanto.pt>

🌐 <http://www.esperanto.pt/plus.htm>

ALIAJ LANDAJ ORGANIZOJ:

(sendependaj de Portugala Esperanto-Asocio)

Regiona Esp.-Asocio (Ouré)

☎☎☎☎ (anoncotaj; NB90:4)

Saluton! — Cooperativa dos Amigos do Esperanto e da Natureza

✉ Avenida Bissau Barreto, 2
 PT-3360-191 PENACOVA

LANDAJ REPRESENTANTOJ:

U.E.A.: Manuel PINGUINHA

TEJO: (vakas)

E.E.U.: Luís LADEIRA; José MARTINS

ILERA: Francisco MELO (CI(GE))

EJA: Faria de Bastos

SAT: Pedrosa ALVES (kotizp.)

IKEK: Alcino ALVES

NUMEROJ KAJ REFERENCJOJ

Ekz.: «NB12:3-4» indikas pĝ. 3 ĝis 4 de *Nia Bulteno* n-ro 12. Aliaj: *Bb (Bubo)*; *IL (Informa Letero)*; *ELV (Esperanto — Língua Viva)*; *NS (Nia Stelo)*; *LK (La Karavelo)*; *RPE (Revista Portuguesa de Esperanto)*; *SI (Saudação Informilo)*.

Sgnf. de logotipo kun numero:

♣1234/567 aŭ ♣1234: asociano;

♣12.345: Libro-Serva varkodo;

bibl.: ♣♣1234 aŭ ♣♣A123: libro k.s.;

♣♣123: periodaĵo; **albmuj:**

♣♣1234: foto; ♣♣1234: eltondaĵo.

ARANĜOJ:

Zfesto kun tri jubileoj

La 15-a de decembro, **Tago de Zamenhof kaj de la Esperanta Literaturo**, trafos sabaton en 2012 kaj ĝin nia asocio festos per tutposttagmeza sesio en sia sidejo — kutima laŭ loko/tago, speciala laŭ la programo. Ĉefteme rolos **triopa jubileo**:

125 jaroj de esperanto (1887.06.02: publikigpermeso de la *Unua Libro*),

120 jaroj de esperanto en Portugalio (1892: unua lernlibro, de Jayme Heinlein FERREIRA), kaj

40 jaroj de Portugala Esperanto-Asocio (1972.05.10: fonda ĝeneralasemblea kunveno).

Tri programeroj inspiriĝis kaj pritemos po ĉiu el tiuj vojmarkaj eventoj. Krom tiu rigardo al la pasinto, la estonto prezentigos per la publika **transdono de diplomoj** pri esperanto-kapableco (je baza kaj meza niveloj) al la ekzamenitoj de la antaŭa semajno (p.8). La salonan programon komplementos paralela bufedo en la saloneto kaj la servoj de la vendejo kaj oficejo, kiel en kutima sabato.

Programo:

12:00 Ariĝo por apudsideja tagmanĝo (neof. prog.)

14:00 Atenda periodo kun spektado de fotaroj kaj esperantlingvaj filmetoj

14:50 Bonvenigo, prezento, kaj inaŭguro, fare de estrarprezidanto José Manuel MARTINS

15:00 Sónia APOLINÁRIO pri “Esperanto en Portugalio, 1892-1972: deveno, firmiĝo, subpremo” (*)

16:15 Gonçalo NEVES pri “Zamenhof kaj *Volapük*” (§)

17:30 A. MARTINS-Tuválkin kaj Wilson BRÍGIDO pri “Forpasintaj figuroj de nia asocia historio”

18:15 Diplomcerimoniao, gvide de Nádia PENAS

19:00 Filmo *Fetorafero*, nova versio (NB94:8)

19:30 Komuna kantado, gvide de Filipe SIM-SIM

20:30 Adiaŭo kaj disiro / libera programo **AMT**

(*) Samtema kiel ties magistriga diserto (NB92:9) akademie prezentita en 2012.12.04 (vd. NB96).

(§) Monografio menciita en NB92:8. Pro foresto de la aŭtoro, anstataŭanto laŭtleĝos kurtigitajn kaj ne okazos kolokvo.

LINGVO:

P.E.A. lanĉis **retpoŝtan tradukservon** (portugal-kajesperant-lingve), celatan al la ekstera publiko: Mesaĝoj al <traduzir@esperanto.pt> sendiĝas al skipo da 3 spertaj tradukemuloj kiuj reagos pli malpli rapide. Ĝi celas komplementi la maŝintradukajn servojn de, i.a., Google (<http://translate.google.com/>). **AMT**

INFORMADO:

“Praajlare”

La 19-an de septembro vespere okazis prelego pri esperanto gvidata de Iuri GASPARE, en *Casa Amarela / CACAV*, de *Alhos Vedros* (*), mun. *Moita* — loka kultura organizo, kiu iniciatis la eventon. Ĉeestis ĉ. 20 personoj, inkl. la loka Komunumestro, kaj asociano MARTINS-Tuválkin. Malgraŭ iama loka agado pri esperanto (Augusto PEREIRA JÚNIOR, António Serafim DIAS, k.a.), la temo estis preskaŭ nova por multaj el la ĉeestantoj, kiuj elmetis demandojn dum la kollokva parto, pleje interesajn. Interkonsentiĝis ebleco pri baznivela kurso okazonta en tiu samaejo, en 2013. **AMT**

(*) Urbeto & komunumo *Alhos Vedros*, duonŝerce asimilita Praajlaro.

ARANĜOJ:

Dum 2013 okazos en la **najbara ŝtato** pluraj vizi-tindaj aranĝoj kiujn por-tugalaj esperantistoj po-vos malgraŭkrize ĉeesti: **9-a IRO** (NB93:9), Madri-do, 2012.03.15-17; la **72-a HEK**, Saragoso, 2012.05.03-05; kaj la **86-a SAT-Kongreso**, en Madrido, 2012.07.28-08.04. **AMT**

GASTOJ:

ĈEL ĉe ni

La semajnfino 2012.11.17-18 vizitis Lisbonon Jiāng Lì mí n / 蒋利民, re-dakciano de *El Popola Ĉi-nio* kaj vicdirektoro de Ĉi-na Esperanto-Ligo (<http://chinareports.org.cn/zz/qgsx/>) kiu nune deĵoras en la Libro-Servo de U.E.A. Lin ak-ceptis en la sidejo estrarano MARTINS-Tuválkin, ĉe kiu li informiĝis pri la landa movado. Donace-toj interŝanĝiĝis kaj li ri-cevis ekzempleron de la esperantlingva prospek-to pri *Sintra*, kie li poste sola turismadis. **AMT**



Vespereno



Vespereno



Vespereno

Scenoj el Palmelo: Podie ambaŭ Mar-tins-estraranoj prezentas la eventon, dum montriĝas fotoj de pasintaj aranĝoj (**ĉisube**). Kvaropo el la "suda bordo" pre-tiĝas al la matena kolokvo (**meze**). Spek-tantoj atentis pri daŭrkulturo (**plejmal-supre**). Dum la dimanĉa tagmanĝo, Pe-drosa omaĝas la fromaĝon (**dekstre**).



Vespereno

ARANĜOJ:

Palmelo allogis, sed ne multajn

■ *Nuno MAGALHÃES*

Jam junie *Nia Bulteno* 94 anoncis la 26-an R.P.E.on en *Palmela*. Ne mankis informoj per *pea_diskut*. Ankaŭ ĉe *facebook* estis pria paĝo. Iom poste aperis aniĝpaĝaro en *esperanto.pt* kaj aniĝintoj (el ambaŭ retejoj) estis 35 (*).

Parto-prenintoj estis tamen dek tri (el kiuj kvar ne inter tiuj antaŭaniĝintoj.) Ekskuzoj por ne parto-preni multtis kaj estis pleje bazlernejaj.

R.P.E. mem similis al aliaj: estis en nova loko, estis prelegoj kaj vizitoj, novaj vizaĝoj, malnovaj temoj, vidindaĵoj, bonfarto kaj bonforko. Malsimilis al la ĵusaj, speciale *Espinho* (NB92:6), tio ke ni havis bonan salonon — dankendas ja al la urbestro la disponigo de la municipa biblioteko kaj de ties plurmediaj aparatoj (kaj pacienço).

Frumatene ekalvenadis homoj, sed nemultaj: Ambaŭ “martinsoj” aŭtis al la iom fora trajnstacidomo por taksiumi veturintojn al la urbcentro, laŭ promeso, sed neniu venis...

Tiuj du estraranoj podiumis kaj prezentis la renkontiĝon; forfalis la “anoncota” matena prelego kaj anstataŭis ĝin ronda tablo (fakte, seĝringo) kun primovada diskutado.

Post fiŝpladara tagmanĝo, la salona sesio pluis: Malgraŭ preskaŭ senvoĉa, nia prezidanto prezentis pri daŭriva kultivo kaj respondis pridemandojn. Sekve oni spektis subtekstigitan

filmon (‡) kaj eksperimentan filmeton produktitan de P.E.A. (‡*). Samtempe Wilson deĵoris ĉe portebla libro-servo, kie i.m.a. vendiĝis kalendareto (★00.152), sur kies dorsflanko reklamiĝas la R.P.E.oj de 2012 kaj 2013 (pĝ.12).

Jam vespere dekduo foriris hejmen kaj forgasteje, postlasinte palmele unu fieran verdulon por gardi la eventon. Sekva-matene la dektrio iĝintis... sepo. Oni promenatis al kastelo (bedaŭrinde tiam renovigata, sed ne tro) kaj postrestis por ĝui pejzaĝon. Dum kelkaj esploris la muzean fakon, gvidataj de Miguel BOEIRO, aliaj atente observis ĉirkaŭaĵojn el la plej alta turo, al kiu poste ĉiuj aliaj grimpis, eĉ s-ro Pedrosa ALVES, mem plene renoviĝinta (NB94:3). Post tagmanĝo homoj adiaŭis kaj disiris. Frufiniĝis la 26-a R.P.E.

Same kiel okazas kun kiu ajn evento organizita ĉu de P.E.A. ĉu de alia organizo, necesas tempo, planado, homfortoj, vojaĝoj al la loko, kontaktoj kun apogontoj (urbestroj k.s.) kaj multaj aliaj detaloj. Oni ankaŭ elspezas monon kaj la enspezoj de neregistara organizo tia kia P.E.A. ne abundas (ĉu kvante ĉu kvalite), ĉefe el kotizoj de signifa parto de la asocioj (pĝ.6-7).

Eĉ tiel, kelkaj parto-prenantoj senhonte kritikis la organizadon...

Ĉu eble la aniĝilo por 27-a R.P.E. en *Mora* aperu kiel eble plej frue? Ĉu eble organizantoj (ja jam komenciĝis) postulu kotizon kaŭ antaŭpagon? Ĉu eble oni luu taksion por ĉiu parto-prenonto? Mi ne scias... mi lacas. ■

(‡) *Knabino kun perlo*, jam spektita en Zif2005 (NB89:9).

(‡*) Prova versio de *Fetoraĝero* (NB94:8): Skripto de Eduardo NOVEMBRO; reĝisorado de MARTINS-TUVÁLKIN; voĉoj de Maria RAPOSO, Iuri GASPAR, Luís OLIVEIRA; aktor-trejnado de Irina TUVÁLKINA; kromaj dankoj al Olivia-Mar BELGAR, Marta MARTINS, Rui PALMA. Vd. NB96.

(*) Ambaŭ daŭre konsultebaj: <http://esperanto.pt/rpe026/> kaj <http://www.facebook.com/events/364607373628092/>.

ASOCIO:

Kie do $\frac{1}{2}$ mil' da ni?

■ A. MARTINS-Tuválkin

Je sia 40-jariĝo nia asocio havas malpli da membroj ol iam ajn antaŭe...

Ŝveligi la anaron

La nombro de anoj de Portugala Esperanto-Asocio estas **159** (kp. NB83:6-7). La nombro de fluaj esperanto-parolantoj kiuj loĝas en Portugalio, aŭ kiuj estas portugaloj loĝantaj alilande, konataj de nia asocio, estas **148**. Tamen **nur 68** el tiuj estas asocioj (*).

Tiu ĉi situacio estas dinamika: Ja tre multaj el la novaj membroj de la lasta jardeko asocianiĝis jam post ekono de la lingvo, kaj nuntempe pli da homoj eklernas esperanton ekster la asocio ol iam ajn antaŭe (NB96).

Plia historia novaĵo, kompare kun la P.E.A. de 1972, 1975, aŭ 1987, estas ke ĉe tiuj esperantistoj nemembroj apenaŭas ia ajn malŝato al la asocio aŭ al la cetera esperantistaro. Kaj fine — inter tiuj 67, pluraj estas ligitaj al P.E.A. kiel geedzoj aŭ gefiloj de asocioj (notindas, ke nur du el la ok portugaloj denaskuloj membras en nia asocio).

Sed, malgraŭ ĉio, veras ke, se jen pli ol duono de la lingvosperta esperantistaro de la lando restas ekster la asocio, kaj eĉ multe pli koncerne komencantojn (*), do klare ĉerpendas el tiu nombro la novaj nepre necesaj homfortoj.

(*) Informoj de 2012.12.03. La distingo inter fluparolantoj kaj komencantoj (diverstipaj, ink. "eternaj") estas arbitra, varia, kaj ne oficiala. Konataj komencantoj ekster la asocio estas 283, ene 60. La sumo estas do 491 konataj ambaŭnivelaĵoj esperantistoj portugaloj. La vera totalo supozeblas ĉ. milo. Krome, ni havas kontakton kun 672 pliaj ielaj interesatoj kiuj ne scipovas esperanton — same kiel la ceteraj 31 asocioj.

Tial, en 2012 la estraro iom malpasis pri la varbado de novaj membroj inter esperantistoj kaj lernantoj, kaj nove kaj jame konataj. Kontraste al ĵusaj jaroj, la nombro de novaniĝoj notinde kreskis: Ok novaj asocioj en 2012 — sed neniu en 2011, nur unu en 2010, kaj du en 2009. Espere en 2013 pluos tiu ĉi kresko: Ja ne mankas potencialaj asocioj. (Dum la jaro 2012 ankaŭ ege kreskis la eksanigoj: tridek unu, rekordo de la ĵusa jardeko, ĉefe pro ekscio pri delongaj forpasoj.)

Preter ĉi tiu demando kiel asocianigi esperantistojn staras tiu pri kial entute tion fari, pri tio, ĉu la "asocia modelo" plu validas en mondo draste ŝanĝiĝinta koncerne iloj por civitana esprimiĝo kaj kunlaboro. Jen demando tro vasta por tiu ĉi teksto: En 2005 (NB86:8-9) ni skizis respondon — ĉu *jam temp' está* por reanalizo?

Vetkuro al kotizoj

Ne la unuan fojon menciigis en *Nia Bulteno* la nesimpla situacio pri la membro-kotizoj pagendaj al Portugala Esperanto-Asocio, cetere ĝia ĉefa kaj preskaŭ sola monfonto (NB86:6-7; NB80:20; NB78:11). Dum kelkaj asocioj rutine pagas normale ĉe la jarfino (kaj tial nenormale laŭdindas), tro multaj forgesas prie kaj bezonas atentigon.

La membreparadigmo en nia asocio estas ne "abono" (t.e., laŭ kiu oni pagas ĉiujare kotizon por unujara aneco, aŭ ne) kiel en U.E.A. kaj en plejmultaj landasocioj, sed paradigmo simila al tiu de akademioj kaj ordenoj, uzata kutime en portugaliaj societoj k.a. neregistaraj neprofitcelaj organizoj: Anoj ligiĝas "por ĉiam" al la asocio, rajtas ekŝigi kiam ajn je averto (eksigo fland-

ke de la estraro pro longa nepago aŭ nekontakto estas provizoreca), eksigintoj rajtas novaniĝi iam poste (sed tiun rompon oni konsideras pli signifa ol flegman «Mi ne abonis ĉijare...»), kaj ankaŭ eblas ke nepagitaj kotizoj akumuliĝas eĉ je jaro post jaro. Tio ebligas /devigas al ni membradministradon nekutiman en Esperantio (§).

Tial, la nombro de P.E.A.-anoj raportata ĉiujare al U.E.A. — ties «aligitaj membroj» (§*) —, estas kutime esprimita pere de du sumeroj, ekz. «96(+63)» (pĝ.2; NB83:7), kio signifas 159 agnoskitajn membrojn sed ke la kotizmono ricevita dum la lasta jaro egalas al la kotizo de nur 96 anoj (la preciza kalkulo estas pli detaloza...). Tio permesas al ni pagi nian kotizon al U.E.A. proporcie al la (malmulta) kotizmonon kiun ni ricevas de nia membraro, sed ankaŭ, dum tiu ne superas centon da tiaj “membro-ekvivalentoj”, signifas ke la reprezentanto de nia asocio ĉe la Komitato de U.E.A. estas ne plenrajta komitatano “A” sed simpla observanto.

Dum la lastaj monatoj okazis aparta klopodo pri kotizpagigo, kio, krom la aldonan enspezon kiun la asocio ege bezonas, ebligas ankaŭ verŝajne ŝanĝi tiun situacion, redonante al la P.E.A.-anaro voĉon ĉe la decidorgano de U.E.A.: Nur necesas enspezinti (per malfrupagoj kaŭ novaniĝoj), fine de 2012, kotizojn proporcie al 100 asocianoj. Ĉu ni sukcesos?... ■

(§) Kiu foje kaŭzas eĉ miskomprenojn: Kaj pri anoj (foje ofenditaj) kies forlason la estraro **misedduk**tis el bagatelaj kontaktproblemoj, kaj pri anoj (foje ofenditaj) kiuj malprave supozis sin eksigintaj post longa **sena**-verta nepago.

(§*) Krom tipa asocia strukturo kun individuaj membroj, Universala Espeanto-Asocio estas ankaŭ ia federacio de landaj asocioj (inkl. Portugalan Espeanto-Asocion), kiuj kotizas al ĝi proporcie al siaj anaroj.

LINGVO:

Lingvaj notoj de ASA reaperas 5a-foje



Ree haveblas la libro *Apontamentos Gramaticais de Esperanto*, de A. S. Almeida (NB91:30). Ĝi prezentas portugallingve unuopajn aspektojn de la gramatiko de esperanto kaj ĉiun klarigas; ekzemploj kaj avertoj abundas. Supozeblas ke tian profundan analizon bezonas ne komencantoj, ja dume ne kapablaj legi ĝin en esperanto — sed jam kvin eldonoj atestas pri ĝia neceso.

Tiuj notoj ekaperis dise, inter 1974 kaj 1979, en *Revista Portuguesa de Esperanto* (*) sed baldaŭ la aŭtoron oni instigis librigi la tuton. Libro do aperis en 1978 (RPE28:23), ankoraŭ kun la pli simpla titolo *Apontamentos de Esperanto* (★98.128; ★B162), kaj kun sur 287 paĝoj nur 88 ĉapitroj (374 en la ĵusa versio). Sekvis baldaŭ dua eldono, kun multaj plibonigoj kaj jam la nuna titolo; aperis tria en 1990 (328 pĝ.), kaj kvara en 1997 (295 pĝ.). La kvina eldono, finpolicita komence de 2011 (§), enhavas reajn plibonigojn kaj laŭas la nunan portugallingvan ortografion. **AMT**

A. S. Almeida: *Apontamentos Gramaticais de Esperanto*. Portugala Esperanto-Asocio: Lisbono, 2012. 170×120×24 mm³ 190 g 203 pĝ. 12,50 €. ISBN 978-972-9471-38-1. ★01.024; ★B3415; <http://www.lulu.com/product/14834137>. (♯)

(*) RPE10:83; RPE14:14; RPE15:47; RPE16:79; RPE17:107; RPE18:7; RPE19:8; RPE20:16; RPE24:10-11; RPE25:50-51; RPE26:68; RPE27:103-104; kaj RPE28:21-22.


(§) La antaŭa eldono elĉerpigintis fine de 2010; pri la malfruo reeldoni kulpas ne la aŭtoro.

HOMOJ:

Memore pri Manuel RUAS

Forpasis 83-jaraĝa en junio 2012 **Manuel RUAS**, elstara intelektulo portugala kiu eklernis esperanton en 1999 kaj diplomigis kiel altnivela kursano en 2003, kune kun Iuri GASPAS kaj Cosme RESINA. Nekrologo en lia-partia gazeto *Avante!* (aŭg.23) sciigas krome ke li pri nia lingvo «verve varbadis» («*fazia calorosa propaganda*») ★G0663).

Lastajn jarojn li agadis plentempe kiel faktradu-



ANICO

Manuel Ruas en 2005

kisto el la lingvoj angla, hispana, franca, kaj itala. Pli frue en lia kariero li okupiĝis pri matematikinstruado kaj pri filmado: Unue kiel teknikisto, poste kiel muntisto, klubprogramisto, kaj reĝisoro (kina kaj televida; NB89:13). En P.E.A. li sekretariis la Kontrolkomitaton (en 2001-2005) kaj la Asemblean Stabon (en 2005-2007). Restas memoro pri liaj vasta kleroj, diskreta afablo, kaj malnaiva engaĝo. **AMT**

LERNADO:

Nova salutonestro

La instruadon de esperanto en la lisbona pensiula asocio «Saluton!» (NB91:25) transprenis oktobre Wilson BRÍGIDO el Eduardo CRISPIM. La nuna grupo da 6 lernantoj ĉeestas horan lecionon merkrede je la tria posttagmeze. Novaj kursanoj tuttempe akceptatas. **AMT**

LERNADO:

Bovisto 4 kursojn!

Miguel BOEIRO vastigas sian kursinstruagado: Al la jamaj (vd. NB94:7) aldoniĝis *Universidade dos Coruchéus* (Lisbono), kie grupo da 12 lernantoj pensiaĝaj ĉeestas unuhoran lecionon altern-semajne laŭ *Esperanto: Curso Elementar em 20 Lições*, de Manuel S. TEIXEIRA (★ 01.006: 3,60 €; vendata kun korektaro). Li estas ankaŭ invitita gvidi en 2013 intensivajn kursojn en Oporto kaj Horto, subtene de lokaj instancoj. **AMT**

LERNADO:

Ekzamenoj sideje

La trian de decembro 2012 finiĝis la sidejaj kursoj, baz- kaj mez-nivelaj, (NB 94:7) per ekzamensesio, kiu estis ankaŭ malfermita al memlernintoj kaj alikursanoj. Entute atendatis ĉ. 20 homoj; ĉeestis ses; du pliaj ekzameniĝos la postan semajnon. Ĉiu kandidato respondis skriban demandaron kaj submetiĝis al parola testo kiu daŭris po ĉ. 15 min. Por ĵurianoj en la parola testo estis invititaj Wilson BRÍGIDO, Eduardo CRISPIM, kaj Luís LADEIRA, kiuj tamen ne ĉeestis; ilin anstataŭis la du ĵusinstruintoj. La demandaron de la baza nivelo kunmetis A. MARTINS-TUVÁLĤIN kaj Wilson BRÍGIDO, kaj tiun de la meza Iuri GASPAS; la korektadon faras skipo kiu inkluzivas tiujn tri plus NádIA PENAS, Alexandra PAZ, kaj A. S. ALMEIDA. Ekzameniĝo (kaj inkl. diplomigo: pĝ.2) kostis 20,00 €; senpage por sidej-kursanoj kaj asocioj. **AMT**

INFORMADO:

MalTEDe kaj "ludeme"

La anoncita TEDx-konferenco (*) en Madrido (15-an sept.; NB94:3) rete spekteblas i.a. ĉe <http://www.youtube.com/watch?v=doNEawgNf0A>. Evidentiĝas ke la kurioza novvorto "indjano" en la biografio de la prelegonto, bilbaano David de UGARTE, erarigis multajn (kaj min!) pri la temo (§). Nenia specifa rilato al amerikindigenaj lingvajtoj — la prelego estis ja «en esperanto kaj pri esperanto kiel lingva liberprogramaro!», kiel la prelegonto mem trankvilige informis la dubemulojn eksciintajn pri lia noveco kiel esperantisto. Dum la prelego mem, brilis nekutima kombino de freŝesperantista entuziasmo (§*) kun malnaiva pritakso de tre aktualaj demandoj pri libera ilar-uzo kaj -elekto, flanke de homo kun vastaj spertoj en la "normala" mondo. La kutimajn argumentojn (neŭtraleco & facileco) li interpretis vigle kaj freŝe, kaj ĉefteme la analogion inter homa lingvo kaj softvaro (kvankam ne nova) li prezentis tre trafe, koncize, kaj komplete, antaŭ publiko konvinkiganta ĝis fina staraplaŭdo — kiun ne ĝenis la nenecesa uzo de "ekzota" lingvo, ensorbintan la enhavon el surekranega teksttraduko. La lingvnivelo, eĉ se ne plene glata (ĉu "ludemulo" trafas por la anglaĵo "hacker", eĉ laŭ hispana uzo?), estis tamen atentinda kaj ŝtopplena je trafegaj esprimoj kiuj verŝajnas "instantaj ŝlagroj": Jen "samtavolano", "naturlingvo", aŭ "programaro".

Ancxjo

(*) Aliaj TEDx prelegoj pri esperanto kaj rilataj temoj: **Tim Morley**, en *Cambridge* (Britio), 2012.03, pri bazlerneja lingvinstrua propeŭtiko per esperanto (<http://www.youtube.com/watch?v=8gSAKU0Elsq>); **Fabrizio A. Pennacchietti**, en *Torino*, 2010.10, pri esperanto kaj lingva Darwin-ismo (<http://esperanto.torino.it/nova/?p=515>); **Benny Lewis**, en *San Antonio* (Usono), 2011.10, pri praktika memlernado de fremdaj lingvoj — li mem esperantisto poligloto (<http://www.fluentin3months.com/tedx/>); **Sandra Fisher-Martins**, en *Oporto*, 2011.03, plede por simpla, sentrompa lingvaĵo en kontraktoj kaj porklientaj sciigoj (<http://www.ted.com/talks/sandra-fisher-martins-the-right-to-understand.html>). (Vd. ank. esperantajn tradukojn de diverstemaj TED-prelegoj <http://www.ted.com/pages/286?lang=eo.>)

(§) Jen (metafore) «indio: elmigrinto (al "Hindioj") kiu revenis al sia hejmloko kun freŝaj ideoj»: "Indjano", paronimo de "indiano", estas kreaĵo de Fernando de Diego (NB88:10-11) — kaj eble unu el la plej mistrafaj. UGARTE kaj liaj samkooperativanoj nomas sin tamen indianoj, metafore, kaj sian teknologikonsultentreprenon *Las Indias Electrónicas* (<http://lasindias.com/>).

(§*) Pretere, la sukceson madride antaŭ ĝenerala publiko sekvis movada konflikto en Bilbao inter la "indjanoj" kaj la loka klubo. Tiu rapide disamiĝis rete kaj altris la atenton de i.a. HEF, *Libera Folio*, kaj... G. Silfer. Legu i.a. <http://www.liberafolio.org/2012/la-esperanto-klubo-en-bilbao-timas-201dindjano201d-atakon>.

HOMOJ:

FS~ hejmen

Multajn siajn personajn esperantaĵojn la karmemora movadestro Franco SIMÕES (NB82:6) gardis sideje — ja liaj esperantaj projektoj estis plejparte asociaj. Estis do agrabla surprizo kiam oktobre venis familia invito ekposedi pliajn postlasaĵojn: Abundo da leteroj, fotoj kaj dosieroj (klasifikotaj), plus libroj, gazetoj, kaj kasedoj, alportitaj sidejen de estraranoj WB kaj AMT. AMT

LITERATURO:

Meridianoj premiitaj

Sekve de tiea jarkomenca prezentiĝo (NB92:10), la 20-an de oktobro ricevis la verkinto Henrique MADEIRA premion "Pres-tigio UniQ" al lia dulingva poemaro *Meridianoj* (NB91:32), atribuitan de loka kulturklubo *Teatro Som das Letras* (Queluz SNT). Malgraŭ peto de la aŭtoro (ĉiam ema komunigi laŭdojn al la tradukinto, A. S. ALMEIDA) ne eblis ĉeesto al la invititaj esperantistoj, kaj do laŭplanadulingvadeklamado ne povis okazi. AMT

LITERATURO:

Plena verkaro de Eduardo NOVEMBRO

La publikigita verkaro de **Eduardo NOVEMBRO** (mallonge **EdNov**, verknomo de portugala esperantisto José Eduardo Rosa CRISPIM: *NB94*:8) konsistas ĝis nun el 65 eroj (*), aperintaj en sep malsamaj periodaĵoj kaj en du libroj. La tuto dividiĝas proksimume egale inter tekstoj originalaj kaj tradukitaj, sed menciindas ke dek-kvinon el ĉi-lastaj aŭtorintis portugallingve li mem. (*).

Tradukita poezio

- “Novaj Olimpiaj Ludoj” (F. SYLVAN): *Informilo 4/92(=67)* (1992.07-08): 9^{⊗*}.
 “Universaleco” (Fernando SYLVAN): *Informilo 1/93(=70)* (1993.01-02): 8^{⊗*}.
 “Infaneco” (Fernando SYLVAN): *Informilo 84* (1995.05-06): 10^{⊗*}.
 “Memorŝtono de 1945” (F. SYLVAN): *Informilo 6/93(=75)* (1993.12): 14^{⊗*}.

Originala poezio

- “La Hundejo de S-ro Smito”: *Informilo 76* (1994.01-02): 14-15[⊗]. *La Karavelo 1* (2007.10): 21.
 “Plezuro”: *Sennaciulo 1221* (2007.03): 44^{*}. *La Karavelo 1* (2007.10): 22.
 “Revi sen revo”: *Informilo 147* (2007.07-09): 5^{*}.
 “Ateista Preĝo”: *La Karavelo 1* (2007.10): 22.
 “Du-Monat-Aĝa Malamiko”: *La Karavelo 3* (2007.12): 10.

(*) Ne enestas ĉiliste multaj portugallingvaj artikoloj pri esperanto kaj rilataj temoj (pleje el verknomo **EdRo**), kaj ankaŭ ne iuj neliteraturaj tekstoj esperantlingvaj. Same ne la premiita dramo “Fetorafero”, publike prezentita ĝis nun nure kiel filmskripton (p.3).

(*) El pli famaj aŭtoroj, du kromajn homoj (parte samnombajn) oni ne miskomprenu kiel pliajn heteronimojn: Orlando José Rosa CRISPIM estas frato de nia aŭtoro, kaj Eduardo DINIS estas iama laborkolego lia.

- “Kion mi volus iĝi”: *La Karavelo 4* (2008.01): 22.
 “Revado”: *La Karavelo 4* (2008.01): 22.
 “Finfine Paco”: *La Karavelo 11* (2008.09-10): 8.
 “Graveco de Sengravuloj”: *La Karavelo 11* (2008.09-10): 8.
 “Orgasmo”: *La Karavelo 12* (2008.11-12): 12.

Originala prozo

- “Sp^ĉciala Rakonto”: *Etaj Rakontoj*: 119-127.
 “Pri Sinjoro Silva”: *Sennaciulo 980* (1987.01): 3^{*}.
 “Kiel Leonelo mortigis sian patrino”: *La Karavelo 19* (2009.12): 17-18.
 “Liberaj Tempoĵ”: *Liberaj Tempoĵ* (2010): 19-123.
 “Paradizero en Infero”: *La Karavelo 21* (2010.06): 21-23.
 “Legendo pri Egas Moniz”: *La Karavelo 22* (2010.09): 14-15 (kolofone mise «de Egas Moniz»)[⊗].
 “Legendo pri Martim de Freitas”: *La Karavelo 23* (2010.10): 15.[⊗]
 “Legendo pri Mem Ramires”: *La Karavelo 24* (2010.11): 16 (kolofone mise «Mem Martins»)[⊗].
 “Legendo pri Deu-la-Deu Martins”: *La Karavelo 25* (2010.12): 10-11.[⊗]
 “Naiva Elreviĝo”: *Monato 32/12* (2011.12): 21^{*}.

Nefikcia prozo (*)

- “Al-Madan Pasteĉoj”: *Informilo 138* (2005.04-06): 15^{*}.
 “Mia Fenestro estas... Belvedero”: *Informilo 139* (2005.07-09): 8^{*}.
 “Tornistro-Furoro”: *Informilo 140* (2005.10-12): 5^{*}.

“Karuselo”: *Informilo* **141** (2006.01-03): 10^{*}.
 “Azenrajdadoj”: *Informilo* **142** (2006.04-06): 14^{*}.
 “Ĉu ankaŭ nia Moruo?”: *Informilo* **143-145** (2006.07-2007.03): 19^{*}.
 “Reĝmortigo” (anon.): *La Karavelo* **5** (2008.02): 21-22. Kun «notoj de João José SANTOS».

Memtradukita prozo

“La Morto de l’Artisto”: *Nia Bulteno* **14** (1977.05-06): 5-6[Ⓢ]. *Sennaciulo* (1977.12?): 9[Ⓢ]. *Etaj Rakontoj*: 9-12.[Ⓢ]
 “Kortuŝa Ploro de Infano”: *Monda Karuselo* **16** (1980.02): 15-17[Ⓢ]. *Etaj Rakontoj*: 21-24.
 “Post Domo Ŝtelita”: *Revista Portuguesa de Esperanto* **26** (1978.08): 75-76[Ⓢ]. *Etaj Rakontoj*: 15-18.
 “Karnavala Trompo”: *Etaj Rakontoj*: 27-32.[Ⓢ]
 “Forrabo”: *Etaj Rakontoj*: 35-39.
 “Virino Sidanta ĉe Pordsojlo”: *Etaj Rakontoj*: 43-48.
 “La Kalkulilo”: *Etaj Rakontoj*: 51-56.
 “Du fungoj kaj unu onidiro”: *Etaj Rakontoj*: 59-63.
 “Arbo duiĝe Fendita”: *Etaj Rakontoj*: 67-72.
 “Memmortigo...”: *Etaj Rakontoj*: 75-78.
 “Respondo al la Anonco”: *Etaj Rakontoj*: 81-86.
 “Perdrika Nesto”: *Etaj Rakontoj*: 89-94.
 “Amdeklaro”: *Etaj Rakontoj*: 97-100.
 “—La Juĝato Leviĝu!”: *Etaj Rakontoj*: 103-107.
 “Estis foje... Erao de Timo!...”: *Etaj Rakontoj*: 111-116.

Tradukita prozo (‡)

“Tiu Mielkuko” (Eduardo DINIS): *Nia Bulteno* **39** (1988.08-07): 6,11-12[Ⓢ].
 “La Unua Rakonto” (Ed. DINIS): *Nia Bulteno* **40** (1988.09-10): 6,11-12[Ⓢ].

“«Buick»” (Eduardo DINIS): *Informilo* **1/90** (1990.01-02): 9-11[Ⓢ].
 “Netaŭga por la Profesio” (O. J. R. CRISPIM): *Informilo* **1-2/90** (1990.03-04): 14-15,18[Ⓢ].
 “La Naĝisto” (Romeu CORREIA): *Informilo* **3/1990** (1990.05-06): 9-12[Ⓢ].
 “Antaŭ la Morgaŭo” (Eduardo DINIS): *Informilo* **5/90** (1990.09-10): 9-12[Ⓢ].
 “Malbonŝanco” (O. J. R. CRISPIM): *Informilo* **1/91** (1991.01-02): 9-10[Ⓢ].
 “Vizito je Sunsubiro” (O. J. R. CRISPIM): *Informilo* **3/92** (1992.05-06): 15-17[Ⓢ].
 “Sciu, Sinjoro Detektivo” (Ed. DINIZ): *Informilo* **71** (1993.03-04): 13-11[Ⓢ].
 “La Ambiciuloj” (O. J. R. CRISPIM): *Informilo* **73** (1993.08): 12-13[Ⓢ].
 “Aŭtobusa Haltejo” (Eduardo DINIS): *Informilo* **110** (2001.01-02): 9-11[Ⓢ].
 “Kaŝita Fiŝkaptado” (Ed. DINIS): *Informilo* **113/114** (2001.07-10): 9-13[Ⓢ].
 “Lasta Toreado en Salvaterra” (Rebello da SILVA): *La Karavelo* **2** (2007.11): 18-22. Kun «notoj de JJS».
 “Dronado de Barkestro” (Raúl BRANDÃO): *La Karavelo* **6** (2008.03): 19-20.
 “La Infanistino” (Eça de QUEIROZ): *La Karavelo* **7** (2008.04): 17-19.
 “La Trezoro” (Eça de QUEIROZ): *La Karavelo* **8** (2008.05): 15-18.
 “Benplena Mateno” (Trindade COELHO): *La Karavelo* **9** (2008.06): 21-23.
 “La Ĉemizo” (Fialho de ALMEIDA): *La Karavelo* **10** (2008.07-08): 21-23.
 “Baptopatra Nomo” (Gervásio LOBATO): *La Karavelo* **13** (2009.01): 15-17.
 “La Maizbulkoj” (Alfredo de MESQUITA): *La Karavelo* **16** (2009.06): 19-21.

Notoj: Aŭtoreco atr. al Eduardo NOVEMBRO en ĉiuj publikigoj, malkrom: * EdNov ‡ Eduardo ROSA * Eriko NAVARO. @ Aŭtoreco neindikita. ☉ Tradukaŭtoreco neindikita. © «Gramatikkorektis: António ALMEIDA» Ⓢ Portugallingva originala publikigita en *República*, 1949; atr. al Homárius. ☒ Serio “Iam en Portugalio”.



Ora ŝildo, kun karnkolora mano, eliranta el la ŝildmalsupro, tenanta verdan palmfolion, metitan palise, akompanatan per du ruĝaj turoj, malfermitaj el la ŝildkampoj. Ŝildsupre, la bluj ŝildetoj de la Portugalia blazono, metitaj kruce, ŝarĝitaj unuope per po dek argentej moneroj, el kiuj la du flankaj ŝildetoj pinturmitaj ŝildmezen, akompanataj per du purpuraj krucoj de Sankta Jakobo, ĉiu ŝarĝita unuope per po unu ora pekteno. Argenta murkrono kun kvar videblaj turoj. Blanka rubando kun nigra devizo "Vila de Palmela" ("Urbeto Palmelo").



Argenta ŝildo, kun tri verdaj tritikspikoj kuniĝitaj per ruĝa kordo ŝildmalsupre. Nigra bordero ŝarĝita per ok oraj abeloj. Argenta murkrono kun kvar videblaj turoj. Blanka rubando kun nigra devizo "Vila de Mora" ("Urbeto Moro").

Blazonbildoj de Sérgio Horta;
teksttradukoj de Jorge de Matos.

Portugala Esperanto-Asocio

26-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj

Palmela, 2012.10.06-07

27-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj

Mora, 2013.10.04-06

REMETENTE:

Associação Portuguesa de Esperanto

Rua Dr. João Couto, 6-r/c A

PT-1500-239 LISBOA

PORTUGAL

DESTINATÁRIO:

nº de sócio
anunero

últ. quota paga
lasta kotizpago

foto
foto

laste ricevita interŝanĝnumero
(abonantoj kaj aldonacatoj ignoru)